

Geografia nomenklaturu, 2-a parto
Deklaro de Internacia Komisiono por Ordigo de Geografiaj Nomoj
Claude Gacond, 273-a radioprelego, 1969.03.12 & 15

Parolas Claude Gacond.

La pasintan semajnon ni vin atentigis pri la graveco de la debato malfermita de Tibor Sekelj per la eldono de *Mondmapo* kaj propono de geografia fundamenta nomenklaturu.

Kiam oni atente rigardas tiun mondmapon, oni miras pri la malabundeco de la nomoj. Vere temas pri minimumo. Sed kiam oni ekstudas tiun nomenklaturon, oni konstatas, ke multo en ĝi estas ankoraŭ diskutenda.

Ni ĵetu rigardon al la nomenklaturu, kiu pli precize koncernas nian landon Svislando. Sur tiu mondmapo Svislando ricevas la nomon **Svisujo**. Tri urboj estas indikitaj : **Ĝenevo**, **Berno** kaj **Zuriĥo**. Oni trovas la riverojn **Rodano** kaj **Rejno**. Pri la montoj oni trovas **Alpoj**. La nomo de tiu montaro mankas sur la mapo mem. Verŝajne forgeso.

Ni do konstatas, ke sep radikoj nin koncernas. Ĉar ni estas en epoko de kontestado, ni kritikis la elekton de la sufikso **ujo**. Kiel vi konstatas, nia radio sin nomas **Radio-Svislando**. En la UEA-jarlibro nia lando estas listigita sub **Svislando**. La esperantistaj societoj aŭ evitis la nomon de la lando : **Svisa Esperanto-Societo**, **Svisa Asocio de Esperanto-Fervojoj**, aŭ elektis la nomon **Svislando** : **Esperanto-Edukistaro de Svislando**, **Esperanto-Junularo de Svislando**.

Internacia Komisiono por Ordigo de Geografiaj Nomoj petas la esperantistojn **praktike uzi la donitajn nomojn (sen alternativo)** dum kvaroj da jaroj. Tio signifus ŝanĝon de titoloj, kiuj estas nun bone konataj. Ni malobeos tiun peton daŭre parolante en la nomo de **Radio-Svislando**. Plie ni havos la okazon diri, kial ni ne sisteme uzos la proponitajn esperantigojn kaj al ili foje preferas la pli naturajn formojn **Bern**, **Roma**, **London**.

Antaŭ ol ekzameni la proponitan nomenklaturon ni legu al vi la **deklaron** de Internacia Komisiono por Ordigo de Geografiaj Nomoj :

« La Internacia Komisiono por Ordigo de Geografiaj Nomoj informas la esperantistaron, ke post ok-jara laboro ĝi estas preta prezenti la unuajn fruktojn de siaj klopodoj : la unuajn 850 nomojn el fizika kaj politika geografioj, kiuj estas troveblaj sur tiu ĉi Mondmapo.

La Komisiono plene konscias, ke ne ĉiuj nomoj kontentigos ĉiujn esperantistojn. Sed ankaŭ pri tio, ke en multaj kazoj estas praktike neeble trovi solvon, por ĉiuj akcepteblan. Eĉ komisionanoj mem ofte ne konsentis pri iu aŭ alia nomo, kaj tiam estis necese decidi per voĉdonado.

Ni klopodis :

*unue ke ĉiu nomo estu skribita per literoj el la Esperanta alfabeto,
due ke ili estu esperantigitaj, kaj ne laŭeble plej korekte **transskribitaj** el unu nacilingvo,
trie ke por ĉiu objekto estu nur unu nomo, sen alternativoj, kiuj nur plilongigus la ĥaoston,
kvare ke du objektoj ne havu la saman nomon kaj
kvine ke geografia nomo ne estu konfuzebla kun alia vorto.*

Ni ofte devis serĉi kompromison inter la

- a) zamenhofaj principoj,*
- b) jam enradikiĝinta esperanta uzo,*
- c) internacia rekoneblo,*
- ĉ) deziro de la esperantistoj el la koncerna lando.*

Tial la geografiaj nomoj ne estas konsekvencaj laŭ iu regula skemo, sed liberaj individuaj unuoj, kiel nomoj de personoj, montoj, objektoj.

Geografia nomenklaturu, 2-a parto
Deklaro de Internacia Komisiono por Ordigo de Geografiaj Nomoj
Claude Gacond, 273-a radioprelego, 1969.03.12 & 15

*La Komisiono ne pretendas altrudi la nomaron per arogo de iu ajn aŭtoritato. Ĝi simple prezentas al la esperantistaro **eblan solvon**, laŭ sia plej honesta bontrovo. Tamen ĝi petas la redaktorojn de la Esperanta gazetararo, verkistojn kaj ĉiujn aliajn esperantistojn **praktike uzi** la donitajn nomojn (sen alternativo), kaj post 3- 4-jara uzo voki nian atenton al tiuj, kiuj estas praktike neuzablaj, kaj tial nepre korektendaj. Ni kolektos la kritikojn, atente trastudos ilin, kaj ekkonsideros la dubajn nomojn por nova eldono de la ĉi **Mondmapo**.*

La nunaj membroj de la Komisiono : profesoro Gaston Waringhien, licenciato Tibor Sekelj, profesoro J. M. Mablesone, Profesoro David L. Armand, C. Butler, F.A.F. Faulhaber, profesoro C. Stop-Bowitz kaj A. W. Thomson.

Ni nun revenu al la proponita nomenklaturu. Ĝi formas du grandajn ĉapitrojn : Sub la rubriko *Geografiaj nomoj por fizika mondmapo* estas registritaj kvarcento da radikoj aŭ esprimoj. La geografiaj nomoj por politika mondmapo donas liston de landoj, popoloj kaj urboj. Pli ol kvarcent nomojn.

Ne nur geografiaj nomoj estas listigitaj, sed ankaŭ fakaj terminoj necesaj en geografio : mapo, hemisfero, skalo, projekcio, ekvatoro, poluso, paralelo, meridiano, kaj ceteraj.

Komparante tiun terminaron kun la geografiaj radikoj, kiuj troviĝas en la vortaro de Gaston Waringhien *Grand Dictionnaire espéranto-français* ni rimarkis en la oceanoj du menciindajn diferencojn : La Mondmapo de Tibor Sekelj proponas por la oceanoj **Atlanta**, **Paca**, **Suda**, **Arkta** kaj **Hinda Oceanoj**. Ĉe Waringhien oni trovas **Atlantika** kaj **Pacifika** oceanoj. Oni ankaŭ povas diri **Atlantiko**, **Pacifiko**, **Sudpacifiko**. **Atlanto** ne povas konveni por **Atlantiko**, ĉar ĝi estas arkeologia termino, kiu signifas homfiguron ludantan la rolon de kolono. Aŭ ĉu la Komisiono rezignis pri la punkto : geografia vorto ne estu konfuzebla kun alia vorto ? La insulo **Kuba** estas proponita sub la nomo **Kubo**. Jen alia rezigno pri tiu regulo.

Cetere kripligo de la nomo **Cuba** al **Kubo**, de la riveroj **Misisipi** kaj **Misuri** al **Misisipo** kaj **Misuro** kaj ceteraj povas nur amasigi kritikojn kontraŭ la provo starigi esperantan geografian nomenklaturon. Oni riproĉas al la esperantistoj, ke ili praktikas sian lingvon nur inter si, kaj ne zorgas pri la cetera mondo. Ĉu kiam ili instruas al infanoj la nomon **Misuro** por la **usona** rivero, oni ne rajtos kritiki tiun instruon ? Laŭ ni la esperantigo ne devus kripligi la geografiajn nomojn. Parolu pri la rivero **Misuro** al neesperantistoj, kaj vi povas esti certa, ke ili ĝin serĉos en Japanio, tute ne en Nordameriko.

Al tiuj kripligoj ni preferas la vortojn **Honŝuo**, **Kjuŝuo**, **Rukjuo**, **Ŝikokuo**, kiuj almenaŭ respektas la konatajn **Honŝu**, **Kjuŝu** kaj **Rukju**. Kion dirus japanoj, se ni ilin kripligus al **Honŝo**, **Kjuŝo** kaj **Rukjo**. Sama reago valoras por **Kubo**, **Misisipo** kaj **Misuro**.

La venontan semajnon ni revenos al tiu temo.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis Claude Gacond. Ĝis reaŭdo !

-oOo-